

Ирина Саверьевна Алексеева ,	Ирина Саверьевна Алексеева ,	Ирина Саверьевна Алексеева ,
Odo al Samar- kando	Odo al Samarkando	Ода Самарканду

*tradukita de Vladimir Masalkin*

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*laŭvorta Esperantigo de la germanigo*

Mi kantas vin, ho, Samar-  
kand'  
Kaj laŭdas mi aspekton  
sunan!  
Kaj vian koron — Regi-  
stan' —  
Mi ĉiam pretas nomi juna.

Mi kantas al vi, ho Samarkand'  
Tiun ĉi kanton. Vi restis tiel juna.  
Vi estas konata en la tuta mondo.  
Kiu vin vidis, tiuj devas vin ami.

Пою тебя, о, Самарканд!  
Твой чудный облик восхваляю.  
И твоё сердце - Регистан -  
Я вечно юным называю.

Korbaton ĝian sub stelar'  
Eksentis Ulughbek junece.  
Kaj daŭras de Timur  
centjar'  
Kaj pli ĝi longas majeste-  
ce!

Profeto vin iam antaŭvidis  
En sonĝo antaŭ longa, longa tem-  
po,  
Kaj Temerlan' vin konstruis  
En via tuta majesteco.

Его биенье Улughбек  
Предчувствовал под небом  
звёздным,  
О, Самарканд! Твой долгий  
век  
Величием Тимура создан!

Madrasoj sanktaj estas  
nun  
La ejoj por la art' kaj sen-  
toj.  
Kaj de belec' ilia sun'  
Centjarojn igis la momen-  
toj.

Kaj viaj sanktaj haloj, trezorejo  
De l' arto kaj de l' instruo,  
Jarcentojn ili jam staras tie,  
Kvazaŭ apenaŭ pasis tempo.

Твои святые медресе -  
Приют искусств и  
просвещения,  
Они стоят во всей красе  
Столетия превратив в  
мгновенья.

La poezi' de Navoi,  
Je amo kaj je forto riĉa,  
Tre helpis al popol' de vi  
Fiera resti kaj feliĉa.

Tie ĉi la poeto Navoi  
Estas kantinta pri amo kaj forto,  
Kaj liaj kantoj ankoraŭ neniam  
En tiu lando tute estas forsonin-  
taj.

Здесь Алишера Навои  
Поэзию - любовь и силу -  
Впитали жители твои  
Она их счастьем вдохновила.

De minaretoj kupolar'  
Similas al stelar' ĉiela,  
Beleco de la ornamar',  
Lazuro pura kaj tre hela.

La kupoloj de la minaretoj tie ĉi,  
Ili lumas tage kiel nokte la steloj.  
Per la dekoro de iliaj ornamoj  
Ili salutas ĉiun jam de fore.

Здесь минаретов купола -  
Дневные звёзды в небе ясном -  
Так чистая лазурь светла  
И вязь орнаментов прекрасна.

...

...

...

<p>En saĝa urbo de l'anim' Moske' najbaras kun preĝejo. Por homoj, kiuj amas vin, Vi estas bela rifuĝejo!</p>	<p>Ho Samarkand, urbo de l' saĝeco! Tie ĉi staras preĝejoj kaj moskeoj, Kaj tiu, kiu vin konas, tiu diras, Ke en la mondo li vidis nenion pli belan.</p>	<p>О, Самарканд! Ты - мудрость лет, Здесь рядом церкви и мечети... В тебя влюблённым лучше нет И краше города на свете!</p>
---	--	---

<p>Ho, Samarkand', disfloru pli Kaj gloru vin bonagoj fame! Kaj flugu al eterno vi, Restante apud ni ĉiame.</p>	<p>Ho Samarkand, floru kaj prosperu! Via gloro disfamiĝu ĉie, Kaj eterne nepereema estu! Ankaŭ estonte nin akompanu!</p>	<p>О, Самарканд! Живи, цвети И славься добрыми делами! Навстречу вечности лети И вечно оставайся с нами.</p>
---	--	--

*Traduko de la Rusa poemo "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de Vladimir Masalkin.*

*Arg-860-1734 (2013-03-24 15:52:41)*

*Traduko de la Rusa poemo "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-03-25.*

*Arg-860-1736 (2013-03-26 17:48:13)*

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas Ирина Саверьевна Алексеева .*

*Arg-860-1733 (2014-05-15 12:22:00)*

*Tiu ĉi poemo aperis en 2013 en la libro "Ода Самарканду". Ода Самарканду: пер. на 62 языка / И. С. Алексеева ; ред.-сост.: А. Ионесов . - Москва. : Изд-во журн. "Юность", 2013 . - 91 с. : ил., 2 л. ил.*